David H. Dodge, well known among Esperantists through his connection with *The American Esperanto Journal* and later the *Esperanto News*, is teaching regular classes in Esperanto at the West Y. M. C. A., New York. The course is managed by the institution as a part of the educational department.

The first quarterly meeting of the Philadelphia Society was held Tuesday, October 13. Prof. Grillon and Mr. Luders reported their experience at the Fourth Congress, and short talks were made by H. D. King, councilor for New York, and Arthur Baker, of Chicago. An adjourned meeting was announced for the election of new officers for the ensuing year. Ward Nichols, president, resigned to transfer his sphere of activity to his home town, Atlantic City. The Philadelphia Press reports much interest in the study of Esperanto among school students.

Esperantists of Portland, Seattle, Spokane and other cities are making preparations for a local convention and a great display of Esperanto in the Alaska-Yukon-Pacific Exposition, to be held in Seattle in 1909.

The Bohemian Esperanto Club of Chicago began its second course in October with eighteen new students. Meetings are held every Monday night at 544 Blue Island Avenue and the club is instructed by Dr. B. K. Simonek, an enthusiastic propagandist who has been doing much for the language among his samlinguloj in Illinois and Wisconsin. He reports that there are a few ladies in the class, and that a special class for esperantistinoj will likely be opened this winter. The club expects to finish the first term's instruction with an Esperanto concert. Dr. Simonek recently made a visit to Wisconsin and did much for the cause while there. A club of twenty-two members is just being formed at Kewaunee as a result of his propaganda, the correspondent being Miss Lillian Adams. Miss Lillian Hloupek is organizing a club at Mismicot, and among those taking an active interest at Two Rivers are three teachers in the public schools—Misses Clair Thursby, Maude Shaper and Erma Hessel.

## PITTSBURG ESPERANTO SOCIETY

During the month of October the Pittsburg Esperanto Society has made very satisfactory progress in working out the plans that had been arranged for the winter. In the city there are two elementary classes, one in the Fifth Avenue High School, conducted by President Clifford, with over fifty students, and the other in the Carnegie Library Building,

in the North Side, conducted by Mr James McKirdy, with thirty students. Each Class has held four meetings during the month, receiving a thorough grounding in the pronunciation of the language, preparatory to taking up the grammar and the exercises, Baker's American Esperanto Book being the textbook.

A series of lessons, prepared by Mr McKirdy, began early in the month to appear weekly in the Pittsburg Dispatch resulting in a greatly increased interest in Esperanto, not only in Pittsburg but throughout the State. Many members have been added to the Society through this means, the majority of whom are either entering the various classes or forming independent groups in the suburban sections, while others are studying by themselves, merely calling upon the Society to explain difficulties as they meet with them in the weekly lessons of the Dispatch. The following list of groups will show to what extent the Society has benefited by the publicity given by the local newspapers: Carnegie, about twenty-five students, many of whom are individual members of the Society; West Pittsburg, seven students, most of whom have signified their intention of joining the Society; Wilkinsburg, about twenty students, most of whom are members of the Society; in Braddock there is a small group for the study of Kabe's Reader and Cox's Grammar and Commentary, made up of members who studied during last term of the Society.

The following members of the Society were chiefly instrumental in forming these groups: In Carnegie, Dr Omar Cruickshank; West Pittsburg, M. Ullin Stoneman; Wilkinsburg, Professor Elmer D. Reed, Braddock, Miss Irene Spigelmire. In Monongahela Mr Claude E. Towner, an influential business man of that place is forming a group; and in Ingram Mr D. Samuel Rolston is forming one, while small groups flourish in Duquesne and McKeesport. Altogether there are about three hundred and fifty who are studying Esperanto either as members of this Society or in close touch with it.

About thirty of the old members of the Society are taken care of in two groups, one under Mr Henry W. Fisher, in the Fifth Avenue High School, one in the North Side Carnegie Library Building, for which there is no regular teacher, and one in Homestead, conducted by Dr Andrew Graydon

A radical change has been made in the character of the monthly general meetings of the Society which has resulted already very successfully. They were originally intended for business but this fall that feature has been reduced to a minimum, taking up about fifteen minutes. The remainder of the meetings is taken up with interesting and instructive talks on Esperanto interspersed with songs, readings, recitations, and so on. The meetings being well announced in the newspapers there are usually no less than from two hundred

and fifty to three hundred present at each, many being non-members. Each meeting has thus resulted in satisfactory additions to the Society's membership.

#### PENNSYLVANIA ESPERANTO ASSOCIATION

On Saturday, October 17th, the first annual meeting of the Pennsylvania Esperanto Association was held in Pittsburg. The representation from distant parts of the State was smaller than expected and may be explained from the fact that the Association was formed during the past summer months. The number of applications received, however, since the fall campaign began indicates that the future of the organization is assured.

Among those who attended the meeting were Mr Arthur Baker, of Chicago, who was the guest of the local members of the General Council, and Professor Clayton R. Bowen of the Allegheny Theological College, Meadville. In a short address the former stated that as a result of a three weeks' visit to the East he was convinced that Esperanto had secured a firm foothold in this country, and that those engaged in its propaganda had every reason to look forward to great results during the coming year.

The following officers were elected for the ensuing year: President, Ward Nichols, Philadelphia; 1st Vice President, W. B. Sterrett, of Sewickley; 2nd Vice President, Professor Clayton R. Bowen, of Meadville; Corresponding Secretary, John M. Clifford, Jr, of Braddock; Recording Secretary, James D. Hailman, of Pittsburg; Treasurer, H. S. Keyser, of Pittsburg; Directors, James McKirdy, of Pittsburg; R. W. Tillotson, of Erie; Miss Alice P. Ervin, of Philadelphia, H. W. Fisher and K. C. Kerr, of Pittsburg. These officers and directors will form the General Council of the Association. At a meeting of the General Council held after the adjournment of the general meeting Messrs Hailman, McKirdy and Kerr were elected to act as the Executive Committee.

After careful discussion the General Council decided that it was inexpedient at the present time to select a meeting place for next year. Such meetings tend to arouse great enthusiasm for the movement and the Council thought that it might perhaps be well to have the next annual meeting in some city in the eastern part of the State where the language was trying to obtain a foothold. After a careful survey of the situation the Executive Committee will select the meeting place and announce its decision through the proper channel.

Upon the adjournment of the General Council a banquet was held in the University Club at which the out of town delegates to the convention were the guests of the Council. The hosts were delighted to include among those present Mr Arthur Baker and two of

the principal speakers of the public meeting which was held later in the evening in Carnegie Institute. This public meeting proved to be one of the most enthusiastic propaganda meetings that have ever been held in the city. Dr S. B. McCormick, Chancellor of the University of Pittsburg, presided, and Dr John A. Brashear, the noted astronomer, of Pittsburg, delivered a splendid address on the Unification of the World. A masterly speech on the practical advantages of the study of Esperanto was made by Professor Bowen followed by an interesting address by Professor W. B. Sterrett, the retiring President of the Association. Rev. J. Leonard Levy, in a brilliant talk, spoke of his appreciation of Esperanto and its power for good in the world. Short talks on the language were given by Professor F. S. Webster, of the Carnegie Institute, and Mr McKirdy, of the Association.

At the close of the meeting the Chairman extended an invitation to those present to come forward and meet the officers of the local Society and learn something of the details of the class work being carried on by the Society. As a result almost the entire

audience came forward with great enthusiasm and many new members for the Society were obtained. Suitable literature was distributed and the eagerness with which it was asked for showed that the meeting had produced satisfactory results. It has given an impulse to the movement that will bear good fruit in the future. Esperanto seems to have come to Pittsburg to stay.

The work now before the Executive Committee is to carry on the active propaganda throughout the State. The Committee thinks that the one of the best ways to organize the State will be to encourage the formation of local organizations, stimulate their activity and aid them by the dissemination of lessons and suitable literature, and by means of lecturers supplied by the State Association. The Association stands ready to assist all local organizations in carrying on their work and to help individuals in forming such organizations. Members and others who desire to enter upon such work should communicate with the chairman of the Executive Committee, Mr James McKirdy, 440 Diamond Street, Pittsburg.

(Fino de la Oficiala Parto)



KENNETH C. KERR, SECRETARY OF  
THE PITTSBURG CLUB

## TAGO ĈE LA PUEBLOJ

F. E. ROBERTS

MEZE de Aŭgusto 1903, la skribanto kune kun tri aliaj Chicago'anoj restis dum kelke da tagoj ĉe la domo de amiko proksime de Barranca, Nova Meksiko. Nia amiko proponis ke ni iru Taos'on por vidi la Pueblojn (nomo de indiana gento), kaj ni decidis tion fari.

Matene ni malkuŝiĝis je la kvara horo, kaj trovis, ke la bona edzino de nia amiko jam pretigis la matenmanĝon de ŝinko, ovoj, terpomoj frititaj, pano kaj kafo. Post manĝinte sufiĉe, nia amiko pretigis sian du-ĉevalan veturilon kaj ni ekiris je la kvina.

La domo kie ni loĝis sin trovis ĉe la fundo de Rio Grande Canon, (elparolu "kanjon"). La *canon* ĉe tiu ĉi loko havas kredeble, proksimume 300 metrojn de profundeco. La flanko orienta altiĝas tre krute, kaj ŝajnas kvazaŭ oni povus ĵeti ŝtonon trans la riveron, sed, tamen, se oni penus tion atingi, la ŝtono falus tre malproksime de la rivero.

Unu horo post la ekiro ni alvenis ĉe la supro de la *canon* kaj jam povis vidi la vilaĝon Taos. La vojo estis tra kamparo kie preskaŭ neniu povas loĝi, ĉar ne estas sufiĉe da pluvo por malsekigi la teron. Oni ne povas vidi multe da signoj de loĝantoj homaj, sed tamen, okaze, oni povas vidi aregon da ŝafoj aŭ kaproj, precipe la lastaj. La suno brilis tre varmege, kaj pro tio, ni ekiris je tiel frua horo. La aero tie estas tre klara, kaj oni povas vidi objektojn malproksime je dekkvin mejloj, kvazaŭ nur unu mejlon. La solaj kreskaĵoj, kiujn oni povas vidi estas tiuj, kiujn la loĝantoj nomas *cactus*, kaj *sage brush*. La *sage brush* provizas sufiĉe da nutraĵo por nutri kaprojn, sed tamen, ili devas antaŭen ĉiutage.

La vilaĝo Taos kuŝas en valo ĉe la

fundo de la grandaj ŝtonegaj montoj, kaj entenas ĉirkaŭ 1300 da homoj. Tie ĉi, pro la proksimeco de la montoj, estas pli multe da pluvo, kaj la riveretoj de ia montoj provizas sufiĉe da akvo, kaj la loĝantoj povas tiamaniere kulturi la teron; kaj pro tio, tie ĉi kreskas bone aveno, tritiko, maizo, k. t. p. Ankaŭ ili zorgas bovojn, ŝafojn, kaprojn, k. t. p. kaj pro tio ili prosperas multe.

La vilaĝo estas ŝajne antikva hispana urbeto de la kutimaj sunsekigitaj brikaĵ domoj; krom tiuj, okaze oni povas vidi kelke da amerikaj domoj kaj butikoj. Estas malproksime de la fervojo eble 20 aŭ 25 da mejloj, kaj pro tio, la vojaĝistoj malofte ĝin vizitis, sed tamen, oni sentas bone repagata por la klopodoj, eĉ se oni restas nur unu tagon.

Estas du malgrandaj hoteloj, kie oni povas trovi malbonajn ĉambrojn, manĝaĵojn, k. t. p. En la vilaĝo Taos, vivadis kaj mortis la fama gvido, Kit Carson, kiu estis la amiko de la ruĝhaŭtuloj, kaj pro tio povis servi la usona militistaron bone. Mi vizitis lian tombon ĉe la tombejo Taos'a.

Ni dungis alian veturilon ĉe Taos kaj veturis al la Puebloj kiuj loĝas, eble, du aŭ tri mejlojn de la vilaĝo. Ili loĝas precipe en du grandaj konstruaĵoj de la kutima brika konstruo. Oni diris ke tiuj ĉi domegoj estis konstruitaj antaŭ kvarcent jaroj, sed tamen, ĉu estas la vero aŭ ne mi ne povas diri. Tiuj ĉi domegoj estas de kvar etaĝoj, kaj estas tre eksterordinaraj, ŝajne la dua etaĝo estas, eble, 20 futoj malpli larĝa kaj longa ol la unua etaĝo, kaj la muroj de la unua altiĝas eble du futoj super la tegmento, kaj tiamaniere estis provizita bonan lokon por la defendantoj kuŝi sendanĝere kiam oni ilin atakus; ĉiuj la etaĝoj estis





PUEBLA URBETO

konstruitaj sammaniere, kaj antaŭe, por-  
doj sin trovis sole en la supra etaĝo.  
Eniro kaj eliro sin trovis per ŝtupetaroj,  
la tutaĵoj estis ĉirkaŭitaj per muroj aŭ  
palisaro, por kontraŭstari la atakojn de  
la ruĝhaŭtuloj kamparaj, sed nun la  
muroj estas rompitaĵoj kaj pordoj sin

trovas en ĉiu etaĝo.

Ĉirkaŭ la domegoj estas multe da  
brikaj bakejoj havantaj la formon de la  
abelejoj. En tiujn oni metas fajron por  
hejti la bakejojn, kaj kiam la hejto estas  
sufiĉe, oni eltiras la fajron kaj puras la  
bakejojn, kaj tiam bakas *tortillas* (his-



ONI DANCAS POR BLANKULA MONERETO

pana nomo de kuketoj), da kiuj la virinoj multe bakas. Mi vidis virinojn kaj fraŭlinojn alportantajn grandajn tele-rojn da *tortillas* en ĉiu mano, kaj alian sur la kapo, kaj tiam kurante malsupren la ŝtupetarojn simile kiel ni kuras malsupren sur niaj ŝtuparoj.

La virinoj kaj fraŭlinoj estas beletaj,

sajn, kaj la kutimajn glasperlajn objektojn, k. t. p. kiuj ĉiam plaĉas al ĉiuj ruĝhaŭtuloj.

La regantaro usona fondigis tie bonan lernejon, sed pro tio, ke ni sin trovis tie Augŭston ni ne povis ĝin viziti.

La estro de la puebloj estas elektata



SUB LA RIGARDO DE LA BLANKULOJ

sed iomete timemaj. Ni havis bonan binoklon, kaj kiam ni rigardis ilin per la binoklo, ili forkuris, ĉar eble, ili pensis ke ĝi estis fotografilo, sed poste ni permesis al ili elrigardi tra la binoklo, ili ne estis timigitaj plu, sed staris kviete kaj ridetis. Mi ne scias ĝuste kiom da homoj estas, sed ŝajnas al mi, eble tri-aŭ kvarcent. Oni povas aĉeti tie diver-

en la jena maniero; dujare per interkonsento de la loĝantoj de la du domegoj, estas aranĝitaj ludojn, provojn de forteco, rapideco, lerteco, k. t. p., kaj la domeganoj kiuj gajnas tiun provon elektas la estron, kiu regas ĝis la sekvan-tan elekton; tia elekto ŝajne plaĉas al ili kaj malofte la ordonoj de la estro estas malobeitaj.

### MORALIGO.

La jenan fabelon mi kopiis el germana ĵurnalo:

Du geinfanoj kreskis, ĝis viriĝis la unua kaj viriniĝis la alia, estimante sin reciproke kaj vidigante al ĉiuj sian feliĉecon, tiel senkulpan, kiel tiu, kiun havis

Adamo kaj Evo en la Paradizo. Virino, ŝajne perfekta, diris al ĉiu el ambaŭ: "Via farmaniero ne estas bona." De tiam la geamikoj interparolas kaŝe, ili ruĝiĝas kiam ili publike troviĝas, kaj la protektantino diris al si mem: "Mi ilin moraligis."—A. G.

## LA ESTONTA FELIĈO

Maks Sajnfeld estis konata de longe kiel unu el la plej bonaj junaj verkistoj. Liaj skizoj kaj romanoj estis legataj kun granda plezuro. Malofte kritikisto esprimis akran vorton kontraŭ lin. Li estis konstanta kunlaboristo de la plej bonaj ĉiutagaj gazetoj kaj ĉiumonataj ĵurnaloj.

Nur antaŭ kelkaj monatoj li edziĝis kun la bela virino Roze, kaj, entuziasma, feliĉa, li komencis denove sian literaturan laboron. Li skribis rakonton, en kiu li esprimis sian tutan feliĉon, siajn ĉiujn sentojn kaj sian ĝojplenan humoron. La rakonton li nomis "La Estonta Feliĉo." Ian tempon li tenis la rakonton kaj miris pro sia nova verko. Eĉ lia edzino estis tre entuziasma pro tiu ĉi rakonto kaj ŝi diris ke lia talento kreskas ĉiun tagon kaj ke lin atendas granda estonto.

Maks Sajnfeld sendis la rakonton al la redaktoro, kiu publikigadis liajn plibonajn verkojn. Post kelke da tagoj, li ricevis respondon ke la rakonto estas arta verko, ke la redaktoro neniam ankoraŭ legis tian verkon kaj ke ĝi igos grandan bruon en la literatura mondo.

Ricevinte tian respondon, la feliĉa Sajnfeld karesis sian edzinon kaj larmoj de feliĉo komencis flui el la okuloj de la juna paro.

Tuj post kiam tiu ĉi rakonto estis publikigita, la tuta gazetaro efektive komencis preparoli ĝin. Lekcioj estis donataj, kritikoj estis skribataj, kaj ĉiuj certigis ke oni ne legis tian rakonton dum longa tempo.

La verkisto mem malofte havis tre bonan opinion pri siaj verkoj, sed per "La Estonta Feliĉo" li mem konvinkigis ke li kreis ion grandegan.

Post kelke da tempo okazis io, kiu surprizis Sajnfeld! La redaktoro kiu presigis lian "Estonta Feliĉo" resendis al li artikolon, samtempe enmetinte kun ĝi jenan noton:

"Via jena rakonto estas bona, sed ĝi estas multe pli malbona ol 'La Es-

tonta Feliĉo.' Antaŭe vi faris sensation, nun vi povas malutili al vi mem."

Sajnfeld fariĝis malkuraĝa. Vidante ke lia laboro estis malutila, li konsideris sin ofendita. Tamen, li nenion rakontis al sia edzino pri tio. Li pensis iom kaj forsendis la rakonton al alia redaktoro.

Post semajno Sajnfeld ricevis sian manuskripton kun noto de la dua redaktoro, en kiu estis skribita, ke estas granda ofendo por la redaktoro sendi al alia redaktoro rakonton kiel "La Estonta Feliĉo" kaj al li tian ĉifonon. "Ĉu vi pensas ke ni nenion komprenas?"

Sajnfeld malesperis "Kion mi faros nun?" li pensis. Li decidis forlasi tion kaj skribi ion novan.

Li pretigis novan verkon kaj resendis ĝin al la unua redaktoro. Dum kelka tempo li ne ricevis respondon, poste li ricevis la rakonton. "Vi fariĝis pli malbona," la redaktoro skribis al li, "niaj legantoj atendas de vi ion kiel 'La Estonta Feliĉo.'"

Sajnfeld forsendis tiun ĉi rakonton al kvar aliaj redaktoroj, sed ĉiuj resendis ĝin al li, sciiginte lin ke oni atendas ion plibonan de la verkisto de "La Estonta Feliĉo."

Sajnfeld laste ekscitiĝis: "Tiu rakonto mortigos min. Antaŭ ol oni forgesos ĝin, oni ne presos ion el miaj verkoj."

Kaj kelke da malfacilaj monatoj pasis por Sajnfeld. Kion ajn li skribis neniu redaktoro volis akcepti. La sukcesa rakonto vere malfeliĉigis lin. Li ne perlaboris eĉ cendon dum longa tempo kaj terura mizero komencis regi en lia domo. Alian verkon kiel "La Estonta Feliĉa" li ne povis skribi plu, tion li povis skribi nur tiam kiam li estis en siaj tagoj oraj post sia edziĝo, tiam li sentis alie. Sed oni ne povas ja edziĝi ĉiufoje, kiam oni intencas skribi ion!

Estis tiel malbone, ke li devis doni kiel

garnantiaĵon ion el sia domo por akiri manĝaĵon. Laste li decidis iri al la redaktoro kaj peti lian konsilon.

“Mi jam sciigis vin pri la kaŭzon, pro kiu ni ne presas viajn verkojn,” diris la redaktoro;—“la legantoj sin konsiderus tre ofenditaj. Mi esperas multon de vi. Krom tio ni ne volas malutiligi al via nomo.”

“Mia konata nomo mortigos min!” Sajnfeld diris malespere.

La redaktoro meditis ion.

“Ĉu vi konsentus, li diris laste, presigi viajn verkojn, kun fremda nomo? La legantoj estos kontentaj de viaj rakontoj, vi perlaboros kaj via nomo restos granda.”

Sajnfeld eksaltis pro feliĉo.

“Kial vi demandas,” li ekkriis, “kiu zorgas pri la nomo? Mi konsentas perdi mian nomon kaj ŝangiĝi en alian verkiston.”

En la sama tago, li transdonis ĉiujn siajn skribaĵojn al la redaktoro kaj ili aperis unu post la alia kun la subskribo “Johano Miler.” Li faris la samon por aliaj redaktoroj kaj Johano Miler fariĝis konata verkisto.

Kaj Maks Sajnfeld perlaboris multon da mono.

Tiel trakuris kelke da jaroj. Lia ed-

zino naskis knabon kaj ree io okazis ĉe Sajnfeld. Li komencis skribi rakonton kaj post ses semajnoj li finis ĝin. Sed la rakonto ŝajnis esti tre bona kaj li timis forsendi ĝin. Kian novan mal-feliĉon ĝi povas alporti la li. Li antaŭlegis ĝin al sia edzino.

Kiam li finis legi, li ekrigardis sian edzinon. Ŝi estis pala kiel kalko. Ŝiaj lipoj apenaŭ moviĝas kaj ŝi murmuris: “Tiu ĉi rakonto estas tiel bona kiel ‘La Estonta Feliĉo.’”

Kaj ambaŭ rememoris la malriĉecon, kiun ili suferis pro tiu rakonto. Kaj nun en la feliĉaj tagoj, pro ilia novanaskita filo tia rakonto ree kreiĝis. Ĉu la infano ankaŭ suferu pro tiu rakonto?

Rozo, lia edzino, tuŝis lian manon kaj diris zorgeme:

“Pripensu kion vi faru. Ni estas en granda danĝero.”

La duan tagon Sajnfeld envolvis sian novan verkon en malnovan paperon, fosis profundan kavon ekstere apud la muro, kaj enteregis ĝin tien.

“Kuşu ĝi tie ĉi kaj putru!” Sajnfeld diris kun mieno de venkinto. “Eble homoj trovos tiun ĉi rakonton post mia morto, ili presu ĝin tiam. Mi tiam kuŝos profunde en la tero kaj mia granda nomo neniam suferos pro tio.”



## DUA BRAZILA KONGRESO

(Cirkulero)

La adeptoj de la helpanta internacia lingvo Esperanto jam kunvenis unufoje, la lastan jaron en Rio de Janeiro, dum la Julia monato (el 13an gis la 21an).

Ĉe tiu kongreso, kiun ĉeestis ĉirkaŭ 1500 personoj, oni diskutadis diversajn kaj gravajn problemojn rilate al tiu lingvo, precipe tiuj de la lernado, de la oficiala organo, de la portugala-esperanta vortaro, k. t. p.

Tiu kongreso decidis, ke la dua brazila kongreso de Esperanto efektiviĝos en la ĉefurbo de la ŝtato de S. Paulo, dum la Decembra monato de tiu ĉi jaro.

La neesperata sukceso de la unua kongreso permesas esperi, ke ĉe tiel klera ŝtato, kiel S. Paulo, la kunhelpado estos

ankorau pli granda, ĉar oni celas konigi lingvon, kies celo estas la alproksimigado de internaciaj rilatoj per ligilo ankaŭ internacia kaj helpanta.

Sur la programo, kiu baldaŭ publikiĝos, vidi, ke ekster la labortagoj speciale rezervataj al kongresanoj, estas organizita serio da festetoj, kie la brazilaj geesperantistoj povos sin renkonti meze da amika kunveno. Promenadojn, kamparajn amuzaĵojn, koncertojn, teatrajn prezentadojn, k. t. p., estas tio, kion oni povas jam de nune promesi al kongresanoj.

Sendi la tutan korespondadon pri la dua kongreso al: *Komitato de la Dua Brazila Kongreso Esperantista, Caixó do Correo No. 53, Campinas, San Paulo, Brazilujo.*

# KELKAJ POEMOJ

## DUBA KONTENTECO.

Lau sia propra originalo jam publikigita en  
Puck sub titolo "Americanitis tradukis  
Doktorino IVY KELLERMAN.

Trankvile en kamparo sub la arboj  
Oftege mi ripozas,  
Kaj aŭdas dum ventetoj inter garboj  
Mallaŭte blovas.

Mi vidas nubojn belajn, blankajn, mo-  
lajn,  
Naĝantaj trans ĉielo,  
Montetojn mi rigardas malproksimajn,  
Sub taga stelo.

Nun tre pacema estas mia koro,  
Kvieta absolute,  
Carmata per la dolĉa matenhoro,  
Kaj ĝoja tute.

Kontenta per la paco de Naturo,  
Mi ensorĉita restas,  
Nenion pli volante de plezuro,  
Ĝis klare estas—

Aŭdita malproksime raŭka sono  
De grand' aŭtomobilo,—  
Kaj tuj neniĝas Naturpaco,  
Per sonorilo.

Aŭdante tiun automobil-sonon  
Mi ĉion ekmemoras;  
Riĉecon kaj la el riĉeco povon  
Ĝi elsonoras;

Ho vane estas ĝui Naturkoron,  
Kaj dume senaktivi,—  
Elpelu mi la tro paceman horon,  
Mi volas vivi!

## LA GALANTO.

Pasinta estas la Vintrego,  
Lasinta estas pordon neĝo,  
Senviva tamen restas jaro;  
Ĝis el Spirito tuj anaro  
De la Galantoj, rapidantaj,  
Printempon rajdas salutantaj,  
Belegajn kapojn almontrantaj.

Jam ŝajnas kiel mem-volantaj  
Neĝeroj, kiuj, persistantaj,  
Ne fluidiĝas, esperantaj  
Mem-savon, dum malesperego  
Pikadas per venena sago.

Nun tiel brilas lumo Dia,  
Plimulte ol Galanto tia,  
Kaj kontraŭ kruelagonio.  
Ĝi ĝojas en ĉiel-ario;  
Bonvenu, floroj de Galanto,  
Ho! mia kanto, Esperanto!

GEORGE MACLOSIE...

## IAJ RUBALJAT DE OMAR ĤAJJAM DE NASAPUR

El perse anglen tradukis Edŭara Ficĝerald  
jaron 1859.  
El angle ĵetis R. H. Gehegan jaron 1908

vekigu!—ŝtonon ĵetis jam maten'  
En nokto-pelvon; steloj kuras for;  
Jen orient-ĉasist', per luma brid',  
Tureton altan kaptas de sultan'.

Revinte, sub matena ĉiel-rug',  
Mi aŭdis voĉon ene de drinkej':  
"Vin levu; tuj plenigu vazon, ĉar  
Sekigiĝos en ĝi ŝata viv-likvor'."

Dum kantis kok', starantoj apud pord'  
Ekkriis: "Do malfermu; nia halt'  
Mallonge daŭras; eble tien ĉi  
(Vi konas) venos ni neniam re."

Malnov-dezirojn vekas nova jar',  
Pensem-anim' sin tiras for de mond',  
Al kie elas blankan manon brand'  
Moisan, kaj Mesian spiron ter'.

Kun plen-rozaĵo pasis jam Iram',  
Sep-ringa vazo pasis de Ĝamsid';  
Ankoraŭ donas rubenaĵon vin',  
Ankoraŭ floras ĉe river' garden'.

Slositaj estas lipoj de Daŭid',  
Sed per pralingva dia: "Vin', vin', vin',  
Rug'-vin'!" al rozo plendas najtingal',  
Por ke pal-vangon ekrugiĝu ŝi.

Pokalon do plenigu; ĵetu for  
Pent-veston vintran al printempa fajr';  
Al temp-bird' restas nur mallonga spac'  
Surfirti;—nun flugul' rapidas jam.

Burĝonoj kun, sun-lev' vekigis mil,  
Fariĝis polv' floroj dekfoj-cent;  
Somera roz-portanta ĉef-monat'  
Ĝamŝidon, Kajkobadon prenas for.

Tendiston sekvu, kaj de Kajkobad'  
Forgesu sorton, kaj de Kajhosru';  
Forlasu forto-spertojn de Rustum',  
Kun bona Hatim-taja gastamec'.

Min akompanu al malvast-herbej',  
Dezerton kie frangas semitaj';  
Egalas tie sklavo kun sultan',  
Bedaŭri povas reĝon ni sur tron'.

Revante sub verd-branĉ', kun versaĵar',  
Kun kruĉ' da vin', kun pana bulk', kun Ĉi  
Kantanta ĉe mi en dezerta land',—  
Sufiĉa tie estus paradiz'.

Sopiras unuj glorojn de ĉi-mond',  
Di-paradizon unuj ŝatas plu;  
Ha, kason kaptu, sen signif' restaĵ';  
Atentu ne al malproksim-tambur'.

Rigardu rozon ĉie ĉirkaŭ ni:  
"Naskite, mi tuj ŝiras de monuj'  
Ligilon silkan," diras ŝi kun rid',  
"Kaj bel-trezorojn ŝutas al ĝarden'."

Pri mond-espero penas vana hom',  
Fariĝas cindroj—aŭ prosperas—ĝi,  
Kiele sur dezert-vizaĝo neg'  
Momente brilas kaj elpelas sin.

Flav-grenon gardas unuj en grenej',  
Al vent' ĝin jetas unuj sen pri-gen':  
Mortaj, nek tiu iĝos nek ali'  
Or', kiun volus reelfosi hom'.

Pripensu kiel, monda ĉe hotel',  
En kiu pordoj estas tag' kaj nokt',  
Sultan', loĝinte horojn unu-du,  
Tuj cambron cedas al plinova reĝ'.

Hodiaŭ glorajn kortojn de ĝamŝid'  
Lacert' travagas kaj sen-gaj-leon';  
Azen' monteja batas per pied'  
Nun super kap' de ĉiupov-Bahram'.

Mi foje revas ke, plej ruĝe roz'  
El ter' ŝprucita de heroo sang'  
Eikreskas kaj ke, falis de buklar'  
Delogo-plena, ĉiu hiacint'.

Sur herbo, kies freŝe dolĉa verd'  
Riveran lipon bordas tie ĉi,  
Apogu vin malpeze! ĝi el lip'  
Kredeble saltas de rav-ĉarmintin'.

For, for, estint-bedaŭr', estont-terur',  
Plenigu vazon gajan de estant';  
Morgaŭe!—Morgaŭ eble estos mi  
Kun hieraŭaj jaroj sepfoj-mil!

Plej bonaj iuj, kiujn temp' kaj sort'  
Elpremis ja el sia vinberar',

Gustumis vazon vicon antaŭ ol  
Ni, kaj silente paŝis al ripoz'.

Kaj ni, en ĉamb'r' lasita kiuj nin  
Ĝojadas, dum gajigas ĝin somer',  
Kanaĵon teran tuj subiros mem,  
Devonte iĝi kanaĵ—kiu pro?

Elspezotaĵon do taŭgigu plej  
Profite ni, ĉar baldaŭ ni sub ter'  
En polvon iros kuŝi, polv' sub polv';—  
Sen vin', kantanto, kanto, kaj sen fin'.

Ĉu oni sin pretigas por ĉi-tag',  
Ĉu oni al morgaŭo donas sin,—  
De turo de mallumo, venas kri':  
"Nek tie rekompenc', nek tie ĉi!"

Sanktulojn kaj profetojn, kiuj du  
Estecojn pridiskutis kun saĝeg',  
Nun ekster-porden ŝovis sort' sen ĝen',  
Ŝtopinte buŝojn polve, kun malŝat'.

Saĝulojn lasu, venu kun ĥajjam';  
Certeĝa estas tio—kuras viv';  
Certeĝa tio, restaĵ' nur mensog';  
Florinte unu fojon velkas flor'.

Aŭskultis juna eĉ mi kun avid'  
De pastro argumenton kaj saĝul'  
Pri tio kaj koncerne tion;—sed  
Elvenis ĉiam mi el enirej'.

Kun ili, longan tempon, de saĝec'  
Flegadis semon mi, per propra man';  
Rikolte sola estas: Monden mi  
Simile akvo venas, iras—vent'.

En eston akve kaj nevole-vole,  
Sen kial aŭ de kie eĉ kompreni,  
Mi fluas; kaj el est' elbovas vente,  
Sen kien koni, kaj nevole-vole.

De tie ĉi re ien,—sen avert'?—  
De tie ĉi re ien,—sen avert'?—  
Ankoraŭ plen-pokalon! Dronu ni  
Memoron de abomenind-senhont'.

De tera centro mi, tra sepa pord',  
Vojaĝis supren al Saturna tron';  
Enigmajn solvis multajn reter voj',  
Sed resits ĉiam homaj mort' kaj sort'

Senĉese restis senŝlosila pord',  
Netravidebla restis vualaj';  
Pri Mi kaj Ĉi nun jen moment-babil',—  
Nek Ĉi nek Mi aŭdigis tiam plu.

Demandis tial mi al volv-ĉiel':  
"Infanojn faletantajn sub nokteg'  
Por gvidi, kian lampon donas sort'?"  
Ĉielo nur respondis: "Blind-kompren'."

Mi lipon metis re al tera kruĉ',  
Por lerni pri mistera vivo-put'.  
"Plen-trinku nun!" al lip' murmuris lip',  
"Mortinte, vi neniam venos re."

## CORRESPONDENCE

### AS TO OUR COVER

IN reply to our requests for opinions as to the best color to be used for cover of AMERIKA ESPERANTISTO, or as to continuing our present method of using a different color for each issue, some letters have been received:

There is but one logical color for the cover to your magazine and that is *green*. Nice rich green—not that bilious May color.—H. B. BESSEMER, *Ithaca, N. Y.*

I should like to see the magazine in a dress of green to correspond with the flag color. Green being the color of growth—progress—there is none better. And why not the star and motto, also, on the front page.—MRS. E. W. CRUMB, *Harveyville, Kansas.*

I prefer the cover of the July magazine, but I see no reason why you should not suit yourself in that matter. The inside is the important part, and I am sure that is all right.—E. P. HOOD, *Omaha.*

### A PECK OF TROUBLES

I belong to a class which has been wrestling with Esperanto without a teacher. So far the combined wit of the class has been sufficient to solve the knotty problems which arise, with two exceptions. We have so far found no equivalent in Esperanto for such sentences as the following:

I have been loving.

*Mi estas aminta.*

She has been away for the summer.

*Ŝi estas forestinta dum la sumero.*

He has been working all the morning.

*Li estas laborinta dum la tuta mateno.*

In other words, how do you conjugate the verb *to be*? The second puzzler is this: How do you pronounce such words

as *longa*? Is it pronounced as two distinct syllables, as *lon-ga*, or should we blend the *ng* as in *finger*, *longer*?

By answering these questions you will greatly oblige a number of readers of your magazine.

EMMA L. SMITH.

*Warren, Pennsylvania.*

The principal trouble with any student is that he is continually translating instead of learning to think in Esperanto. At the risk of hindering rather than helping you, therefore, we give a few forms of the verb as requested:

*Esti estinta*, to have been.

*Esti estonta*, to be about to be.

*Estas estinta*, has been.

*Estas estonta*, is about to be.

*Estis estinta*, had been.

*Estis estonta*, was about to be.

*Estos estinta*, will have been.

*Estos estonta*, will be about to be.

The question of *ng* pronunciation is fully discussed in *The American Esperanto Book*, page 10. The sounds should not be blended as in English, though there is doubtless a strong natural tendency to do this.

### A LETTER IN ESPERANTO

WE do not as a rule publish letters written in Esperanto, for the good reason that they must be copied, if hand-written, before going to the compositors. However, the following letter by Mr. Chas. H. Briggs, of Minneapolis, is written in excellent Esperanto and is full of good advice. Therefore:

*Kara Sinjoro:* Via ĵurnalo pliboniĝas ĉiumonate. Mi opinias ke la septembra numero estas la plej proksima al mia idealo pri publikigaĵo de tiu ĉi speco. Vi atingis laŭ mia opinio la ĝustan balancon inter propagandaj paĝoj, paralelaj kolonoj por eklernantoj, interesaj arti-

lojoj, rakontoj, anekdotoj, la progresado de Esperanto kaj (ne malpli gravaj) allogaj reklamoj. Kiel pruvo mi *mendas* la artikolojn skribitajn en la akompananta letero.

Mi ĝuas la opinion fakon kaj la korespondada fako estas tre interesa. La sola sugestio kiun mi deziras fari, estas ke vi komencigu demandan kaj respondan fakon pri gramatiko, sintakso, kaj traduko de vortoj kaj frazoj. En tiu ĉi fako la demandoj estus numeritaj, por ke, se la redaktoro ne povas aŭ ne deziras respondi al la demandoj, la legantoj povu respondi ilin. Per laborego mi sukcesis trovi vortojn kaj eltrovi kelke da principoj pri kiuj mi vane serĉis ses gramatikojn, sed estus preferinde kaj pliege facile lerni ilin per helpo de via ĵurnalo. Mi havas nun liston da proksimume 25 oftaj vortoj kiuj ne estas en la nova Rhodes' a vortaro. Al mi estus tre utile, se vi publikigus listojn da novaj vortoj kaj sufiksoj tiel rapide kiel la Lingva Komitato oficialigos ilin; ankaŭ specimenajn ekzamenojn por la Atestoj pri Studado kaj pri Kapableco.

We are pleased to announce to Mr. Briggs and others who are interested in the matters mentioned in his letter and other letters in this number, that Mr. E. C. Reed, chief examiner of the Esperanto Association of North America, and head of the American School of Esperanto, will in future edit such a department for us, and it will be a permanent feature of the magazine. Kindly write all queries and problems for this department on a separate sheet of paper (they may be sent enclosed with any letter to us) and endorse on upper left corner the word "Question." Not all, of course, will receive attention, but such will be selected as seem to present problems of general interest.

#### MR. HARRIS ASKS QUESTIONS

WHAT is good Esperanto for "to sit up," meaning the opposite of "to go to bed?" Why should *aminda* be translated "affectionate," when, according to its suffix, it means, *worthy of love*? Is it proper to translate *proksima* as "next?" Ac-

ording to my dictionaries it means "near." What difference, if any, between *legumo* and *vegetaĵo*? Kindly answer in ESPERANTISTO. — HERBERT HARRIS, Portland, Maine.

Firstly, lastly, and intermediately, if you try to precisely express the peculiarities of one language in another you'll make trouble for yourself and your reader and the language you're abusing. To "sit up" doesn't mean anything except that you do not "go to bed" and if you want to say it in Esperanto, why not *ne enlitigis*, or *ne kusigis*? Certainly *aminda* should not be translated "affectionate," because it means "amiable." *Proksima* means "near" and is also sometimes used to signify immediate sequence. We think that when "next" means "first following" *proksima* is rather a lame translation, and frequently prefer to use *sekvanta*. *Legumo* signifies an edible vegetable, while *vegetaĵo* may mean any sort of plant life.

#### UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO.

Unu el la plej gravaj rezultatoj de la Kvara Kongreso estis la definitiva fondo de "Universala Esperanto-Asocio," kiu en malmulte da tempo fariĝos la plej grava internacia organo de nia movado. Ĉar la dirita Asocio estas ankoraŭ malmulte konata en Usono kaj ĉar, laŭ mia opinio, ĝi povas havi grandan signifon en tiu lando, ĉefe pro la 5a kongreso al kiu ĝi penas alkonduki kiel, eble plej multe da Eŭropanoj, mi permesos al mi doni pri ĝi kelkajn sciigojn.

La Universala Esperanto-Asocio (U. E. A.) celas plifaciligi la ĉiuspecajn rilatojn inter diverslingvanoj per Esperanto kaj krei inter siaj membroj fortikan ligilon de solidareco. Por ĉi tiu celo ĝi organizas diversajn servojn internaciajn, kiujn tuj povas uzi tiuj personoj, kiuj vojaĝas, komercas aŭ iamaniere rilatas kun alilingvanoj. Ĝi do ne senpere propagandas Esperanton, sed sin okupas pri ĝia uzado kaj tuja utiligado. Kompreneble, kvankam ne propaganda societo, U. E. A., per sia praktika laboro, multe helpas al la agado de la propagandaj



societoj: uzante Esperanton, oni ĝin certe propagandas.

La organizo de la U. E. A. estas tre lerte aranĝita: En ĉiu loko, kie estas klubo esperantista, tiu ĉi elektas *Delegiton*. La Delegito rekte rilatas kun la Komitato, klopodas por starigi en sia loko la servojn organizitajn de la Asocio, varbas la membrojn, k. t. p. Ĝi elektas mem diversajn konsulojn aŭ informistojn, speciale por ĝeneralaĵ informoj, por komerco & industrio, por virinoj, por junuloj kaj, en marhavenoj, por maristaj aferoj. Tiuj Konsuloj havas la devon respondi al ĉiuj petoj pri informoj, kiujn sendos al ili la membroj de la Asocio. La Delegito devas ankaŭ starigi en sia loko Esperanto-Oficejon, t. e. magazeno, ĉe kiu oni alcentrigas ĉion, kio koncernas Esperanton. Komprenibile, oni elektas jam ekzistantan magazenen, ekzemple libriston, kiu de tio ricevas peran profiton. Fine, en ĉiuj lokoj de sia regiono, kie estas almenaŭ unu Esperantisto, la Delegito elektas korespondanton aŭ Subdelegiton, kiu havas la saman rolon kiel li. Tiamaniere, oni povas diri, ke preskaŭ ĉie la membroj de la Asocio trovos iun, kiu devos respondi iliajn informpetojn aŭ ilin helpi dum vojaĝo.

La laboro de la U. E. A. estas dividita laŭ diversaj fakoj, por kiuj estas komisiita unu komitatano. Tiuj fakoj estos de nun jenaj: Administrado, Financoj, Turismo, Konsuloj, Esperanto-Oficejoj, Komerco, Junuloj. La Komitatanoj rilatas kun la Delegitoj per cirkuleroj aŭ per la oficiala organo "Esperanto."

Ĉiu membro de U. E. A. (oni nomas ilin Esperantianoj) pagas kotizaĵon ĉiujare fiksitajn de la Delegitoj (nun ĝi estas nur 36 Sd!) kaj interŝanĝe ricevas membrokarton, per kiu li povos uzi sen plua pago la servojn organizitajn de la Asocio. Mi donu kelkajn ekzemplojn por komprenigi la funkciadon de la tuta afero: Se Esperantiano deziras vojaĝi li nur bezonos kunhavi la jarlibron de la Asocio; en la plej multaj urboj li iros en la Esperanto-Oficejon, ĉe kiu oni donacos al li Esperante redaktitan gvidfolion per kiu li havos la plej urgajn informojn pri la urbo. Li povos, se bezone, viziti

la Delegiton, kiu helpas al li por lia restado, lin prezentos al la Esperantista Klubo de sia urbo, donos al li la adreson de Esperantisto, kiu povos helpi kiel tradukisto, k. t. p. Oni do vidas la utilecon de tiu afero.

Se in membro deziras informon pri ia ajn temo en ia regiono, li bezonos nur skribi al la Delegito (metante markon por ricevi la deziritan sciigon; se li ne ricevas respondon li havas la rajton plendi al la komitato. Tiamaniere, iu studento, ekzemple, povos facile ekscii pri la kondiĉoj de studado en universitata urbo dank'al la konsuloj por junuloj, komercisto povos koni la komercan kovadon en tia aŭ alia urbo per la Konsulo por Komerco, fraŭlinoj kaj sinjorinoj, kiuj vojaĝas solaj, sin turnos al la Konsulinoj por virinoj, kiuj liveros al ili la necesan helpon, k. t. p. La ekzemploj estas sennombraj kaj per tiu sistemo oni povas fari multajn fruktoriĉajn aplikaĵojn.

En alia kampo, la U. E. A. entreprenas la organizadon de karavanoj, speciale por la kongresoj Esperantistaj; ekzemple ĝi sin proponis por organizi la vojaĝojn de la Eŭropanoj, kiuj dezirus veturi al la Kvina; ĝi starigas Esperantistujojn, kiel jam ekzistas, klopodos por havi en ĉiu urbo Esperanto-domojn por junuloj, starigos liston de fidinda Esperanto-hotelaro, k. t. p.

Neesperantistoj povos ankaŭ uzi ĝiajn servojn kontraŭ pago. Se iu ĵurnalo deziras fari enketon pri ia temo, ĝi sin turnu al U. E. A., kiu per siaj Delegitoj povos doni tute certajn kaj precizajn respondojn. Same por komercisto, aferisto, industriisto, k. a.

La U. E. A., kreita nur atau kvar monatoj, laŭ la iniciato de S-roj H. Hodler kaj Th. Rousseau, jam nun kalkulas pli ol 200 Delegitoj, 90 vicdelegitoj, 120 subdelegitoj kaj 1500 membroj, kaj, post ne multe da tempo, tiuj nombroj multe pligrandiĝos. La honora prezidanto de U. E. A. estas D-ro Zamenhof; la efektiva prezidanto S-ro H. Bolingbroke Mudie kaj la oficejo (fako administrado) sidas en Genevo (Svisujo), 8 Rue Bovy-Lysberg, de kiu oni ricevos ĉiujn necesajn paperojn por grupaj aŭ indi-

viduaj aliĝoj, kaj ĉiujn informojn.

Mi tre esperas, ke Usono baldaŭ havos gravan rolon en tiu praktika organizaĵo, kiu, diris nia Majstro en Dreseno, "estas la plej grava institucio de nia movado." Laŭ tiu maniero la Esperantistaro Usona povas partopreni en ĝi: ĉiu klubo esperantista elektu kiel eble plej baldaŭ Deleĝiton, ĉiu izola samideano,

loĝanta en loko kie ne estas klubo, akceptu la taskon de Subdeleĝito, la aliĝojn ili sendu al la supra adreso kaj interŝanĝe ricevos la necesajn dokumentojn. Tio ne nur certe plifortikigos la Esperantan movadon en Usono, sed ankaŭ plimultiĝos la rilatojn kaj ligilojn inter Eŭropaj kaj Usonaj samideanoj.

EDMOND PRIVAT.

### LINCOLN'S GETTYSBURG ADDRESS

FOURSCORE and seven years ago our fathers brought forth upon this continent a new nation, conceived in liberty, and dedicated to the proposition that all men are created equal. Now we are engaged in a great civil war, testing whether that nation, or any nation so conceived and so dedicated, can long endure. We are met on a great battlefield of that war. We have come to dedicate a portion of that field as a final resting-place for those who here gave their lives that that nation might live. It is altogether fitting and proper that we should do this. But in a larger sense, we cannot dedicate, we cannot consecrate, we cannot hallow this ground. The brave men, living and dead, who struggled here, have consecrated it far above our power to add or to detract. The world will little note, nor long remember, what we say here, but it cannot forget what they did here. It is for us, the living, rather to be dedicated here to the unfinished work which they who fought here have thus far so nobly advanced. It is rather for us to be here dedicated to the great task remaining before us, that from these honored dead we take increased devotion to that cause for which they gave the last full measure of devotion; that we here highly resolve that these dead shall not have died in vain; that this nation, under God, shall have a new birth of freedom, and that government of the people, by the people, and for the people, shall not perish from the earth.

### ALPAROLADO DE PREZIDANTO LINCOLN CE GETTYSBURG

ANTAŭ kvar dudekoj da jaroj kaj sep niaj praavoj kreis sur tiu ĉi kontinento novan nacion, naskitan en libereco kaj dediĉitan al la propozicio, ke ĉiuj homoj estas kreitaj egaluloj. Nune ni estas okupataj pri interŝtata militado, provante ĉu tiu nacio tiel naskita kaj tiel dediĉita povas longe daŭri. Ni renkontiĝas sur vasta batalkampo de tiu milito. Ni estas kunvenintaj por dediĉi parton de ĝi kiel eternan ripozejon de tiuj, kiuj tie ĉi oferis sian vivon, por ke tiu ĉi nacio povus vivi. Estas do tute dece kaj konvene, ke ni faru tion ĉi. Sed en plua senco ni ne povas dediĉi, ni ne povas oferi, ni ne povas sanktigi tiun ĉi teron. La kuraĝaj viroj, kaj mortintaj, kaj vivantaj, kiuj sur tiu ĉi terpeco batalis, jam sanktigis ĝin laŭ grado multe pli alta, ol per kia ajn nia penado ni povus pliigi aŭ malpliigi. La mondo nemulte rimarkos, nek longe memoros, kion ni tie ĉi diras; sed ĝi neniam povos forgesi, kion ili tie ĉi faris. Prefere estas, ne ni, la vivantaj, estu dediĉitaj al la neplenumita laboro, kiun ili ĝis certa grado tiel noble jam faris. Estas pli bone, ke ni tie ĉi dediĉu nin al la grandega tasko restanta antaŭ ni, ke de tiuj ĉi honorataj mortintoj ni ricevu pli grandan sindonecon al tiu afero, por kiu ili tie ĉi oferis la lastan plenmezuron da sindoneco, ke ni tie ĉi alte decidu, ke la mortintoj ne estu mortintaj vane, ke la nacio povu, per helpo de Dio, havi novan naskiĝon de libereco, kaj ke la regado de la popolo, per la popolo, kaj por la popolo ne elpereu el la mondo.

Esperantigis B. F. SCHUBERT, Washington,  
D. C.

**AN OPERA ESPERANTISTINO**  
 DURING the recent Electrical Show at New York City Mr. H. D. King, counselor for that Division, arranged a number of propaganda meetings which were



MME. SEDOHR RHODES

held in the Concert Hall at Madison Square Garden. Mr. Baker was present and talked to a number of large audiences about Esperanto. A thousand copies of AMERIKA ESPERANTISTO were distributed, several hundred "Elements" given away, and quite a number of books sold.

On the first night, after the official opening of the Electrical Show by special phonograph records, one of which was in Esperanto, Madame Sedohr Rhodes, a well-known opera singer of Hammerstein's corps and the possessor of a voice which has won for her the title "Tetrzinni of Venice," sang in Esperanto. According to program she was to have

sung the "Mad Song" from Lucia, which had been beautifully translated for the occasion by James McKirdy of Pittsburgh, but being unable to memorize the text she sang an Esperanto version of "The Two Marionettes."

The printed program of the Electrical Show referred to Esperanto as "the language which will be universal at the hundredth anniversary of the laying of the Atlantic Cable, in 1858." The Show was commemorative of the fiftieth anniversary of that event.

### DR. H. W. YEMANS

ESPERANTISTS of the United States owe a special item of gratitude to Dr. Yemans, whose initiative and push secured the appointment of the government envoy to Dresden, Major Straub. Dr. Yemans did much propaganda work on his



DR. H. W. YEMANS

European trip, and the moment of repose during which the photographer seems to have "sprung" the accompanying picture is by no means a usual attitude with him. Possibly an extenuating

circumstance is that there seems nobody in sight at whom he could talk Esperanto.

### ANTI-TUBERCULOSIS CONGRESS

At the recent international anti-tuberculosis congress Esperanto was given much prominence. Mrs. Wilbur F. Crafts, whose excellent propaganda work through *The Christian Herald* is so well known, distributed a propaganda leaflet especially prepared for the occasion, con-



MRS. WILBUR F. CRAFTS

taining the words from the Ekzercaro which are compounded upon the root *san'*, as well as the translation of ordinary phrases used by Red Cross workers. Mrs. Crafts made a propaganda address about the language, illustrating it with sample words and phrases and an explanation of the grammar. She also read a little speech prepared for the occasion by Cherie Stoner, who was, because of her father's illness, unable to attend the congress.

### GENERAL ESPERANTO NEWS

*Northern Polytechnic Institute, London.*—The yearly report of the instructor of Esperanto in this well-known educational institution shows that the language is being seriously studied as a part of the regular curriculum. Students have much foreign correspondence and are collaborating a translation of "Alice in Wonderland" which will be published when complete. G. L. Browne, the instructor of the class, has followed a very popular example and married an Esperantistino.

*Psikistaro.*—An international union for the study of psychic problems, spiritism, telepathy, magnetism, hypnotism, etc., by means of Esperanto. The address of the secretary is: A. Stas, Strato Antonius, 25, Antwerp, Belgium.

*Internacia Asocio de Instruistoj.*—Tiu ĉi asocio fondiĝis en Dresdeno, kaj ĉirkulero diras, ke dum Oktobro eliros unua numero de gazeto *Internacia Revuo Pedagogia.* La jarabono de la gazeto estos 1.50 spesmiloj, kaj la adreso: Th. Čejka, Bystrice-Hostyn, Moravio, Austrio.

*A Novel Idea.*—In making use of "Elements of Esperanto" as propaganda paper the Spokane Esperanto Society prints a page of information regarding their work and meetings, places where books may be had, etc., and neatly pastes it on the back of the "Elements." We strongly urge that all clubs which wish to have special matter of this character and can afford to have as many as 5,000 copies printed, send their order direct to us, and we can eliminate the 15th page of matter from the edition and substitute the announcement of the club. Esperanto clubs should remember that we are continually producing propaganda matter in large quantities with exceptional facilities for cheap manufacture, and the name and address of a club or individual can be added to part of an edition with small cost. Ordinarily, however, we do not care to do this in less than 5,000 lots of any single item.